



2*1992*149

STARTO

ORGANO DE ĈEĤA ESPERANTO-ASOCIO



SEKRETARIÁT ČESKÉHO ESPERANTSKEHO SVAZU OZNAMUJE:

Protože se objevují případy, kdy platba členských příspěvků neodpovídá platnému příspěvkovému řádu ČES, uvádíme ho zde pro Váš přehled. Výše příspěvků se řídí řádem platným od 1.1.1989.

PRÍSPĚVKOVÝ ŘÁD:

Povinné zápisné pro nové členy		20,-Kčs
Kateg.	Kčs	
A	80,-	výdělečné činní a funkcionáři ČES
B	40,-	důchodci, studenti, vojáci základní služby, ženy v domácnosti, invalidé, nezaměstnaní
C	200,-	podporující esperanto
D	20,-	rodinní příslušníci (člena A,B,C,F,G)
E	20,-	příznivci esperanta, děti
F	1.600,-	doživotní členové
G	60,-	příznivci esperanta dostávající Starto.

Nevidomí členové kategorie A platí příspěvek ve výši 20,-Kčs.

Každý člen kategorie A, B, C, F a G dostává svazový věstník Starto (6 čísel ročně). Kategorie E jedno číslo Starta (poslední v roce). U kategorie E dostávají členové do 15 let vě. dětský časopis Ringo (6 čísel ročně), ostatní jedno číslo Starta (poslední v roce).

Dále je možné se stát za příplatek 30,-Kčs bez ohledu na kategorii i přímým členem ČES. Přímí členové jsou bezprostředně informováni o dění v ČES prostřednictvím zpravodaje "Informátor ČES" zasílaného přímo ze sekretariátu.

U všech kategorií kromě F se jedná o roční příspěvky. Doživotní členství se platí jednorázovým poukázáním 1.600,-Kčs.

U všech kategorií je možno dobrovolně poukázat příspěvek zvýšený o libovolnou částku, která bude považována za Váš dar Českému esperantskému svazu.

UPOZORNĚNÍ:

Číslo Starta 2/92 je posledním pro všechny, kteří dosud neuhradili svůj členský příspěvek pro rok 1992. Pokud tito členové mají zájem svazový věstník nadále dostávat, je nezbytné, aby v nejbližší době vyrovnali své členské závazky, neboť není v nynější těžké situaci pro ČES únosné taková členství dále prodlužovat. Věříme ve Vaše pochopení a pomoc.

Zároveň sdělujeme, že příspěvky všech individuálních členů, tzn. těch, kteří svůj příspěvek neplatili prostřednictvím klubů, došlé k 14.2.1992 by měly být kompletně vyřízeny. Pokud jste dosud nedostali členskou známku pro letošní rok a patříte do této skupiny, prosíme Vás, abyste nás upozornili a zaslali nám příslušný doklad o platbě.

OFICIALA ANTAŬKONGRESO DE ESPERANTO EN PRAGO
1992 - 07 - 19/25

Unu semajnon antaŭ la UK en Vieno okazigas ĈEA kunlabore kun UEA oficialan AK'92, en kiu ni esperas bonvenigi ĝis 300 esperantistojn el la tuta mondo. Bedaŭrinde pro kapacitaj kialoj (salonoj, busoj) ni ne povos senlime akcepti ĉiujn dezirantojn. Krome la tutsemajna kongresa restado en Prago estus tro altkosta por multaj nialandaj esperantistoj. Tamen ni klopodas trovi adekvatan vojon en jenaj reguloj destinitaj por Ĉeĥoslovakio:

- 1) partopreni rajtas sole membro de ĈEA/SEA kun pagita kotizo por la jaro 1992 aŭ dumviva membro,
- 2) en unu tago estu ĉi-kategorie maksimume 20 homoj, /escepte la seminarion pri Komenio/
- 3) unu homo povas partopreni maksimume en tri tagoj.

Ni kredas, ke la proponita sistemo ebligos al ĉiuj veraj interesitoj ĝui la etoson de AK'92. Samtempe ni petas, ke la aliĝontoj skribu nombron de la tagoj kaj prioritatojn en la tagoj por ke oni povu almenaŭ parte kontentigi iliajn dezirojn, se la taga kapacito estus jam plena. Ju pli da variantoj vi skizos, des pli da ŝanco sukcesu, kvankam la aliĝilojn ni kompreneble vicigos laŭ la alventagoj, kies limdato estas 30.4.1992.

Programo

- 19.7. V interkona amuzvespero
- 20.7. AT gvidataj piedekskursoj tra la urbocentro I
PT libera programo
V eta kolokvo pri nuntempa Ĉeĥoslovakio
- 21.7. AT gvidataj piedekskursoj tra la urbocentro II
PT libera programo

La unuaj du tagoj estos dediĉitaj al konatigo kun ĉefaj memoraĵoj de la urbo. Unu promeno-linio koncentriĝos pri la Malnova Urbo kaj la Juda kvartalo, la dua pri la Praga Kastelo, Loreta, Malá Strana kaj la Karola Ponto. La programoj okazos paralele dum ambaŭ tagoj.

- 22.7. tuttage Internacia seminario pri Komenio

Serio de prelegoj celos multflanke proksimigi la vivon kaj verkaron de nia fama pedagogo, humanisma filozofo, teologo, reformisto kaj "prapatro de interlingvistiko", okaze de la tutmonde solenata 400-jara datreveno de lia naskiĝo. La seminario okazos

en historiaj salonoj de la Palaco Valdštejn, nuntempa sidejo de la Ministerio pri edukado kaj de la Muzeo de Komenio, kies vizito konsistigos unu el la partoj de la tuta aranĝo.

V Vespero de la muzika Esperanto-kulturo

La programo prezentos al la aŭskultantoj gravajn reprezentantojn de la ĉeĥa, event. ankaŭ eksterlanda klasika muzika kaj drama artoj.

- 23.7. tuttage Alternativaj busekskursoj
1. Arkitekturaj juveloj de la Suda Bohemio
urbo Tábor, burgo Zvíkov, ŝipekskurso tra la valbararo, kastelo Orlik,
 2. Famaj banlokoj de la Okcidenta Bohemio
Mariánské Lázně /ortodoksa preĝejo, "kantanta fontano"/ kaj Karlovy Vary /porcelanmuzeo, vizito de la produktejo de Becher-likvoro/
- 24.7. libera tago, kadre de kiu okazos por interesiĝantoj pluraj duontagaj eksterprogramaj turismaj ofertoj /kontraŭ krompago pagebla surloke/ interalie:
- ŝipekskurso al la baroka kasteleto Troja
 - busekskurso al Poděbrady
 - alternativaj piedekskursoj tra Prago

V adiaŭa vespero

Unutaga restadkotizo: 35,- Kčs.

Por la ekskursita tago (23.7.) estas starigita kotizo 180,- Kčs, kiu inkluzivas busvojaĝon, tagmanĝon kaj enirpagojn. Ne forgesu anonci vian elekton. Tamen ni rezervas al ni rajton laŭ la nombro de la aliĝintoj eventuale ŝanĝi vian preferatan varianton. Krome: individue laŭ la taga programo oni devos pagi al si ĉiujn elspezojn kiel urban trafikon, enirpagojn, manĝojn k.s.!

Por la de vi vizitotaj tagoj ĈEA povas oferti loĝadon kun matenmanĝo kaj vespermanĝo en internulejo (2 x 3-litaj ĉambroj kun necesejo kaj duŝejo) kontraŭ 110,- Kčs por unu nokto.

La honoraj membroj de ĈEA/SEA kaj ĉiuj kontribuintoj al ĈEA-fonduso en la kupona privatigo ne bezonas pagi la tagajn restadkotizojn, se ili aliĝos ĝis 15.4.

Por faciligi nian administran laboron, ni petas vin sendi vian aliĝilojn ne enletere, sed sur simpla poŝtkarto. En la adreso de ĈEA bonvolu klare indiki "ANTAŬKONGRESO'92".

Al ĉiuj aliĝintoj estos komence de majo senditaj precizigaj informoj kune kun poŝtpagilo.

En la nomo de LKK ĝojatendas vin ĝia prezidanto Vladimír Dvořák.

AMIKO DE ĈSFR, S-RO KURISU KEI,
NOVA HONORA MEMBRO DE UEA

Kurisu Kei estas japano kaj naskiĝis en 1910. La lernadon de la franca en Fremdlingva Kolegio de Oosaka li ne finis. Sian postan edukiĝon li aŭtodidakte prizorgis, al kio tre grave kontribuis Esperanto, kiun li lernis en 1930. Li aktivis en la rondo de t.n. proletaj esperantistoj en Japanio, kiujn la tiutempa reĝimo persekutadis. Sub malfacilaj kondiĉoj - sesfoje arestita - li vigle korespondis kun esperantistoj en Eŭropo kaj Ĉinio. Japanaj tradukoj el tiuj leteroj aperis en 1949 libroforme en "La sama suno lumigas mondon" kaj "Voĉoj de l'mondo". Unu frukto de la korespondado estis lia interesiĝo pri la ĉeĥa literaturo. Komence li uzis Esperanton kiel pontolingvon, sed poste lernis la ĉeĥan kaj la slovakon por rekte traduki el ili en la japanan. Al la verkoj tradukitaj apartenas "La brava soldato Ŝvejk" de Hašek, "Muta barikado" de Drda, "Avinjo" de Božena Němcová, "Milito kontraŭ Salamandroj" de Karel Čapek, "Raporto skribita en pendumila maŝo" de Fučík (el la ĉeĥa) kaj "Malfruiĝintaj raportoj" de Mňačko (el la slovakaj) k.m.a. Krome, li dum pli ol kvar jardekoj kontribuis eseojn, konatigantajn al japana publiko la socian kaj kulturan de Ĉeĥoslovakio. Longe Kurisu estis la sola specialisto en Japanio pri ĉeĥoslovakaj aferoj, kaj nun li estas la plej respektata.

Kurisu neniam preterlasis krediti sian ekokupiĝon pri la ĉeĥa kaj slovakaj literaturoj al Esperanto. Li krome senlace



utiligis sian vastan korespondadon kun eksterlandaj esperantistoj por verki en japanaj gazetoj kaj monataj revuoj pri aliaj temoj, ekz. socialismo en orienta Eŭropo, aŭ pri Esperanto mem. En la kvindekaj jaroj li kunlaboris en la plurvoluma japanlingva verko "infanoj de la mondo", kiu entenis kontribuaĵojn ricevitajn per Esperanto. En 1975 aperis lia japana traduko de "La danĝera lingvo" de Ulrich Lins. En 1990 li tradukis denove el Esperanto, kune kun sia filo, la libron "Tempesto super Akonkagvo" de Tibor Sekelj. En 1977 li iniciatis la fondon de Societo por Japan-Ĉina Amikeco per Korespondado, kiu uzas ankaŭ Esperanton, kaj restas ĝis nun ĝia prezidanto.

Dr. Ulrich Lins

NOMO, DEVENO KAJ VERKO DE KOMENIO MIROSLAV MALOVEC

Ĉijare ni festas la 400-jaran datrevenon de naskiĝo de Komenio, granda pedagogo kaj propagandanto de la ideo de internacia lingvo.

Kion ni scias pri lia nomo kaj deveno?

Post multjaraj esploroj la sciencistoj konstatis, ke lia avo estis Jan Segeš, *fojt* (vilaĝestro aŭ vilaĝa juĝisto) en la moravia vilaĝo Komňa proksime de la moravia - slovakaj landlimo. Lia filo Martin Segeš luis muelejon en Nivnice apud Uherský Brod, sed laŭ sia naskiĝa vilaĝo nomis sin Komeniský. Li edziĝis al Anna Chmelová, kaj la 28-an de marto 1592 naskiĝis al ili filo Jan.

La nomon Amos (= Amato) li ricevis kiel estonta predikisto, kiam li en 1608 eniris la latinan lernejon en Pĕřerov. En 1670 li subskribis la manuskripton de *Clamores Eliae* (Ek-krioj de Elia): "Jan Amos Segeš Nivnický, laŭ la patro nomata Komeniský." La scienca mondo latinigis lian nomon al Comenius kaj Esperantujo al Komenio. Pli preciza estus adjektivo Komenia kiel en la ĉeĥa kaj latina, sed ni ne ŝanĝu la jam enradikiĝintan nomon.

Kion ni scias pri lia vivo?

Liaj gepatroj mortis pro pesto inter 1602 - 1604. Pri la orfo zorgis la onklino Zuzana Nohálová en Strážnice, sed la urbo estis bruldetruita en 1605 de hungaraj trupoj. La knabo estis sendita al Nivnice. Nur en 1608 la ĉeĥfrata eklezio sendis lin al la latinan lernejon en Pĕřerov kaj en universitatojn en Herbron (1611 - 1613) kaj Heidelberg (1613 - 1613). Piede li revenis en Moravion

kaj fariĝis instruisto en Pĕřerov (1614 - 1618) kaj Fulnek (1618 - 1621). En 1616 li estis ordenita pastro, en 1618 li edziĝis. Post la malfeliĉa batalo sur Blanka monteto apud Prago (8.11.1620) la katolikoj persekutis protestantojn, ĉefe pastrojn. Komenio kaŝis sin en la bienoj de Karel ze Žerotína. En 1623 pesto mortigis liajn edzinojn kaj infanojn, en 1624 li edziĝis duafoje.

En 1628 li forlasas la patrujon por ĉiam kaj ekloĝas en la pola Lešno. En 1641 - 1642 li entreprenis vojaĝon al Anglio, Nederlando kaj Svedio. En 1648 mortas lia dua edzino, en 1649 li edziĝas la trian fojon. Mortas ankaŭ la senioro de la ĉeĥfrata eklezio kaj Komenio fariĝas ĝia lasta episkopo. En 1650 - 1654 li provas en la hungara Sárospatak (inter Košice kaj Tokaj) realigis sian lernejan reformon. En 1656 katolikoj bruldetruis Lešnon, Komenio eskapas lastamomente, sed lia domo kun multaj manuskriptoj forbrulas. La lastajn 14 jarojn de la vivo li travivas en Amsterdamo, tie li mortas la 15-an de novembro 1670 kaj la 22-an li estas entombigita en la proksima Naarden.

Kion ni scias pri liaj verkoj?

Komenio verkis preskaŭ 150 verkojn en la lingvoj ĉeĥa, latina kaj germana. Liaj temoj estas pedagogio, pansofio (enciklopediaj scioj), rebonigado de la homa scio, paco, aŭguroj de viziuloj, defendo de malriĉuloj kaj plendado kontraŭ potenculoj, tradukoj el Biblio kaj alegoria satiro *Labirinto de la mondo kaj paradizo de la koro*.


Kion ni scias pri liaj lernejaraj reformoj?

Komenio dividis la homan junaĝon en kvar periodojn po 6 jaroj kaj al ĉiu periodo li determinis unu lernejon: la patrinan (edukado hejme), la elementan, gimnazion kaj universitaton. En ĉiu lernejo oni devas instrui ĉion, ĉar ĉio koneksas kun ĉio, sed sur pli alta ŝtupo pli detale, amplekse kaj science. Eĉ etulo ekkonas la fundamentojn de ĉiuj fakoj, ekzemple astronomion (firmamenton, suno, luno, steloj), geografion (valo, monto, rivero, arbaro), politikon (vilaĝestro, juĝisto, soldato), moralon (peti, saluti, ne mensogi) ktp. Komenio postulis, ke ĉiuj infanoj estu konfidentaj al lernejo, ankaŭ, malriĉaj kaj knabinoj, ĉar neklera patrino ne povas eduki saĝajn infanojn. La instruado okazu en la gepatra lingvo, per ludado, de aferoj simplaj kaj konataj al komplikaj kaj nekonataj. La fremdaj lingvoj estu instruataj per mallongaj artikoloj, kiuj konatigas kun la fundamentoj de fakoj (astronomio, botaniko, zoologio, geografio, anatomio, vestoj, urboj, moralo ktp.) Siaz opinioj li esprimis en la verkoj *Granda Didaktiko*, *Informaro pri la patrina lernejo kaj Pordego de lingvoj malfermita*.

Kion ni scias pri liaj proponoj de universala lingvo?

En la verkoj *Vojo de lumo* kaj *Generala konsulo pri rebo-nigo de la homaj aferoj* Komenio proponis kolekti saĝajn virojn, prepari lernolibrojn de ĉiuj fakoj kaj laŭplane alporti la lumon de klereco al ĉiuj nacioj de la mondo. Por ke la instruistoj povu interkompreniĝi kun siaj lernantoj, li proponas elekti unu lingvon kiel universale internacian. Post rifuzo

de la latina, franca, germana, angla kaj slava pro ilia komplikiteco kaj malperfekteco, li proklamas, ke necesas krei lingvon novan, laŭ racia plano, kiu havos nur minimumon da vortradikoj kaj plej multaj vortoj derivos per prefiksoj kaj sufiksoj. La vortoj povas esti aŭ tute nove elpensitaj aŭ transprenitaj el la latina. Al la problemo li dediĉis la 19-an ĉapitron de *Vojo de lumo* kaj la 15-an libron *Panglotio* de la *Generala konsulto*. En la libro li montras kelkdek metodojn, kiel eblas procedi, sed propran projekton li ne kreas, postulantante, ke la verko estu kolektiva.



HONORAJ MEMBROJ DE ĈEA

* **Jaroslav Mařík** naskiĝis 1913-12-22. Lia unue lernita internacia lingvo estis Esperantido (1929), sed en 1934 li ellernis aŭtodidakte Esperanton kaj en 1935 li membriĝis ĉe Esperanto-Asocio de Ĉeĥoslovaka Respubliko (EAĈSR). Li vere tre aktivis kaj aktivis en la movado. Li estis estro de la Gazetara Servo, kasisto de Radio-komisiono, membro de la Lingva komisiono, membro de Vortara sekcio, ĉefdelegito de la E-junularo, junular-sekciestro de TKKE, redaktanto de la junulara bulteno "Tagiĝo", instruanto kaj ekzamenanto en someraj E-tendaroj, komitatano de AEĈSR, komitatano A de UEA (1950-51), profesia redakciano de la ĉiutagaj E-elsendoj de Radio-Praha (tradukisto, parolisto, komentisto pri E-movado kaj sporto), aktiva partoprenanto en artprogramoj de la "Verda Stacio".

Post likvido de AEĈSR kaj EK Praha li funkciis kiel gvidanto de la interes-rondeto "Esperantista Klubo en Praha" (rezigno en 1962 pro netolereblaj ĝenadoj flanke de la sekreta ŝtata polico).

En 1968-1969 li prezidis la Preparkomitaton de Ĉeĥa E-Asocio kaj en tiu funkcio li 1969-01-27 "solene" transprenis en la ministerio de internaj aferoj la permeson (aprobitan statuton) por lanĉi ĈEA. Kiel estrarano de ĈEA li poste laboris ĝis 1977.

Inter la esperantistoj estas Jaroslav Mařík konata kiel "marŝanta enciklopedio pri la movado". Li estas aŭtoro aŭ kunaŭtoro de multaj verkoj. Pri la movado estas de li verkitaĵ Resuma historio de la Esperanto-Movado (1955, por SET), Skizo pri la Esperanto-historio de Ĉeĥoslovakio (por "Esperanto en perspektivo" de Ivo Lapenna), Kiu kiam? (1987, memorkalendaro, ĉs. parto). Aŭtoro li kunlaboris kaj kompletigis la Historion de la Esperanto-Movado en Ĉeĥoslovakio de S. Kamarýt (1983).

S-ro Mařík preparis Aldonon de novtempaj terminoj por la "Granda vortaro Ĉeĥa-Esperanta" de fratoj Filip (1949) kaj esperantigis la Fremdlingvan korespondadon por filatelistoj (1962) de d-ro P. Kucharský kaj komercan terminaron Alilandano antaŭ vendotablo de Z. Hubka. Male en la ĉeĥan lingvon li tradukis la Armean terminaron de E.D. Durant (1948) kaj Suplementon de Plena Vortaro de G. Waringhien (1954, en manuskripto). Lingve li kunlaboris ĉe Esperanta-ĉeĥa kaj ĉeĥa-esperanta poŝvortaro de R. Hromada.

Laŭ mendo de institucioj J. Mařík tradukis la verkojn Konstitucio de Ĉeĥoslovaka Respubliko (1948), Lerneja reformo de Ĉeĥoslovakio (1949, 1950), Ĉeĥoslovakio en nombroj (1959, 1962), Agadprogramo de K.P.Ĉ. (1968). En la ĉeĥan li tradukis Homlupon de la eston A. Gailit (1936).

Ni ne devas forgesi lian partoprenon en preparo de libroj Praha-gvidlibro (1961) kaj Poŝatlaso de la mondo, kontribuadon al multaj gazetoj Esperantaj kaj ĉeĥaj, kolektadon de materialoj (ekz. pri F.V. Lorenz, biografioj de elstaraj esperantistoj), reviziadon de verkoj kaj tradukoj (lastatempe manuskripton pri Komenio). Li estas la plej aktiva kontribuanto al Starto.

M. Malovec



* **Tomáš Pumpr** - honora membro de ĈEA kaj de la Akademio de Esperanto kaj elstara ĉeĥa esperantisto, poeto kaj tradukisto naskiĝis la 2-an de oktobro 1906 en Dolní Slovénice, studis en České Budějovice kaj la juro-fakultaton en Prago li finis en 1930. Li servis en la ŝtata administracio. Li fariĝis esperantisto en 1926, sian literaturan verkadon komencis per kunlaboro al la Ĉeĥoslovaka Antologio /Budapest, 1935/ kaj en 1962 li fariĝis akademiano. El lia ampleksa traduklaboro nur parto aperis libroforme: *Bukedo el ĉeĥaj naciaj mitoj* de K.J.Erben (1938), *La Babto de caro Vladimir* de K.H.Borovský (1935, 1967), *Sileziaj kantoj* de

Petr Bezruč (kunlabore kun R.Hromada kaj J.Kořínek 1971). Alia poemego de K.H.Borovský *Reĝo Lávra* en lia traduko aperis en La Nica Literatura Revuo (31-32, 1960) kaj lia traduko de *Majo* de K.H.Mácha aperis fragmente en diversaj revuoj, deklarita de R.Rossetti kiel nekompareble supera al la angla traduko. *La babto de caro Vladimir* en lia traduko elvokis huraaĉan entuziasmon de britaj Esperanto-poetoj.

Por la *Simpozio pri ata/ita* redaktita de Kalocsay li verkis 106-paĝan traktaton *Esperanto sen aspektoj?* (Stafeto, 1961). Li kunlaboris teksto-traduke kaj nomenklature ĉe la eldono de *Poŝtalo de la mondo* en Esperanto (1971) kaj tradukis la informan broŝuron *Mallonge pri Ĉeĥoslovakio* (1966). El Esperanto li ĉeĥigis la Konstitucion de Japanio por la ministerio de internaj aferoj. En manuskriptoj restis pluraj tradukoj de poeziaĵoj.

Post la dua mondmilito Pumpr kunlaboris kun la esperantlingvaj art-elsendoj de la Verda Stacio Praha per vico da tradukoj ekz. *Somera firmamento* de Z. Jirotko (1948), *Gracoplena Jesu-Infano de Prago* de Fr. Kožík *Fantomo en la kastelo* de M.Šrámek, ambaŭ en 1948, *Maja fabelo* de V. Mrštík (1950). Inter ili elstaris tradukoj de la oper-tekstoj de *Vendita fianĉino* de Sabina (muziko B. Smetana) kaj *Najado* de J.Kvapil (muziko de A. Dvořák) kaj *En la puto* de Sabina (muziko V.Blodek). Por la nacilingva programo de la radiostacioj Praha kaj Ostrava d-ro Pumpr enĉeĥigis la nederlandan dramon *La mondo ne havas atendejon* de M. Dekker el esp. traduko de F.Paulhaber.

Aliajvice - esperantaj tradukoj de Pumpr servis kiel ponto por alilingvaj tradukoj: ĉinlingve en 1960 la poemlibron de Svatopluk Ĉeĥ *Kantoj de sklavo* (du aliaj tradukoj en la ĉinan: *Sileziaj kantoj* de P. Bezruč kaj *Bukedo* de K.J.Erben ne plu povis aperi sekve de la t.n. Kultur-revolucio en Ĉinio). Lia traduko de *Epitafo* de studento B.Bárta (ekzekutita de nazioj) aperis en la

lingvoj japana kaj dana. Lia traduko de ĉeĥaj popolaj kantoj en Esperanton estis prezentitaj en Internacia Festivalo en Kimrujo, en Londono kaj en Svedlando (de la Infana Radio-Ĥoro de B.Kulínský. Ĉarme satira estas lia *Balado pri Ĉe-instruisto*. Sed li verkis ankaŭ en la ĉeĥa lingvo. Kun Kalocsay li polemikis en Literatura Mondo pri la prepozicio "po" (kun nominativo - Pumpr; kun akuzativo - Kalocsay). Li estis ankaŭ redakciano de La Nica Literatura Revuo kaj de Paco - Ĉs. eldono.

En la organiza vivo d-ro Pumpr gvidis la literaturan fakon de la Esperanto-Asocio, kaj sekretariis en ĝia Ekzamena komisiono. Li fondis kartotekon de tradukoj el la ĉeĥa kaj slovaka literaturoj kaj publikigis la resumon pri ili. Krome li verkis la resumon de la E-gramatiko.

Tomáš Pumpr estis homo amikema, modesta, ekstreme laborema (kio ankaŭ rompis lian vivon) kaj gravsingnifa por la Esperanto-Movado. Alte lin aprezis poeto Karolo Pič en sia *Litomišla tombejo* kaj K.Kalocsay (en Hungara vivo) suspiris triste: "Mi kaj certe multaj kun mi sentas, ke per la morto de Pumpr ni fariĝis pli malriĉaj, ke la ĉarmo senteble malpliigis en la mondo."

(Pat, Van kaj M-ik)

BERNARD GOLDEN: LA NEOLOGISMO "HABILITI"

Ĉar nuntempe Sennacieca Asocio Tutmonda (SAT), la eldonisto de Plena Ilustrita Vortaro (PIV) intencas publikigi novan eldonon de tiu vortaro, la redakcio petas informojn pri misoj kaj mankoj en la nuna PIV kaj ĝia *Suplemento*, kiuj aperis en 1970 kaj 1987 respektive. Krom komposteraroj, lingvaj malĝustaĵoj kaj nekompetente verkitaj difinoj, estas necese prezenti por konsidero neologismojn, kiuj estu registritaj en la nova eldono, ĉar ili apartenas al la aktuala lingvouzo de pluraj esperantistoj. Unu el tiaj vortoj estas "habiliti". La sekvaj citaĵoj ilustras, kiel ĝi kaj ĝiaj variaĵoj estas uzataj en kunteksto.

1. "Jorgen Kunze - profesoro, d-ro, habilitato de natursciencoj, matematikisto kaj lingvosciencisto, gvidanto en la Centra instituto pri lingvoscienco ĉe la Akademio de sciencoj de GDR (Scienca Mondo, 4/1985:13).
2. "Anoj de la Akademio povas esti ĉiuj scienculoj habilitaj aŭ personoj kun sciencaj laboroj, kiuj laŭorde ricevas sciencajn gradojn, rangojn kaj titolojn" (Sano, 4/1984:13).
3. "Rezultojn de sia zorgema esploro de 33 jaroj li publikigis en la medicina bulteno Endokrynologia Polska [...] Ĝi estis lia habilitacia laboro el la j. 1965" (Sano, 1/1985:9).

En la cititaj frazoj, la vorto aperas en tri formoj:

1. habilitacia, adjektivo formita surbaze de la substantivo "habilitacio"
2. habilita, adjektivo formita surbaze de la substantivo "habilito"
3. habilitato, substantivo formita surbaze de la verbo "habiliti"

En kelkaj etnolingvaj-Esperantaj vortaroj troviĝas tradukoj de la terminoj laŭ la uzado en la respektivaj landoj.

1. ĉeĥa (Filip, 1947)
 - a. habilitace - universitata prelegrajto, habilito
 - b. habilitovati (se) - habiliti (sin)
2. bulgara (Atanasov k. al., 1961 kaj Oljanov k. al., 1981)
 - a. - ekzamenteza
 - b. - ekzamenteza profesora pruvverko, sciencdisertaĵo
 - c. - atingi pli altan sciencon gradon (per disertaĵo)
3. slovaka (Seemann, 1970)
 - a. habilitovať sa - docentiĝi, profesoriĝi
 - b. habilitácia - docentiĝo, profesoriĝo
4. pola (Tymiński, 1986)
 - a. habilitacja - docentraĵtigo, docentraĵtigo

Rimarku, ke nur en la ĉeĥa-Esperanta vortaro de la fratoj Filip estas registrita neologismo "habiliti" - jam en 1947!

En aliaj lingvoj la baza signifo de "habiliti" estas rajtigi en jura kunteksto (F. habiliter) kaj kapabligi post lerneja studo (I. abilitare). En la itala lingvo *abilitato* estas abituro, kaj *attestato de abilitazione* estas atesto pri kapableco. La sekva citaĵo difinas habilitado sur la universitata nivelo.

"La Senato de la Scienca Konsilantaro de Humboldt-Universitato Berlin akceptis la laboraĵon kiel "disertacion B", t.e. en kelkaj landoj "habilitacia disertacio" aŭ disertacio por fariĝi "doktoro de sciencoj" (Soveta Unio) aŭ "Kandidato de sciencoj" (Hungario, ĈSSR). Per tiu en GDR plej alta scienca grado al la sukcesinto estas principe malferma ĉiu scienca universitata aŭ akademia kariero - se ekzistas ŝtata intereso pri la fako" (Starto, 2-3/1985:13-14)

Por registrado en vortaro mi proponas, ke la baza radiko estu "habilit-" kun verba karaktero. Pluformado estas tute regula, do la radiko "habilitaci-" estas superflua. Jen la difinoj.

habilit/i - rajtigi al universitata diplomito instrui aŭ plenumi aliajn taskojn en universitato, precipe sur sciencaj kampoj

habilitat/o - persono, kiu posedas la rajtigantan universitan gradon

habilitada disertacio - la laboraĵo, tezo aŭ disertaĵo, prezentita de universitatano por demonstri sian kvalifon ricevi la rajtigan gradon

Rimarko: La verbo "rehabiliti", kvankam etimologie parenca al "habiliti", ne estas pluformita per aldono de la prefikso "re-". Ĝi estas aparta radiko, "rehabiliti", uzata en aliaj kunteksto (komunuza, jura kaj medicina). La difino de "rehabiliti" en la Suplemento de Plena Ilustrita Vortaro ne estas adekvata. Ĝi estas detale difinita en mia artikolo "La difino de la jura faktermino *rehabiliti*" en Internacia Jura Revuo (2/1987:3-8).

AL ARTIKOLOJ PRI LA NOMO DE NIA MAJSTRO L.L.ZAMENHOF

Adolf Staĉura

En Starto 6/1991, p. 10-11, estas Esperanta kaj ĉeĥa traktaĵoj pri la "baptonomoj" de Zamenhof (tiun vorton mi uzas nur tial, por ke la granda plimulto de legantoj komprenu min; Zamenhof, estante hebreo, ne estis baptita). En la ĉeĥa teksto estas mencio: "...li komecncis subskribadi sin L. L. Zamenhof, ne skribante iam tutan sian nomon, ne eblas do diri, ĉu li estis Lazar Ludvik aŭ Ludvík Lazar." La dua aŭtoro en Starto diras sur p. 11, lasta linio super dika nigra streko, ke "Kiel universitatano li fariĝis 'Lazar Markoviĉ Zamenhof'". Laŭ Enciklopedio, p. 580, li finis la universitatan studadon en la komenco de januaro 1885.

En la Originala Verkaro tamen oni trovas sur p. 482 lian komunikon, adresitan al Vladimír Majnov, per poŝtkarto 21.VI. (3.VII.) 1889: "Mia plena nomo estas Ludvigo Lazaro (Ljudovik Markoviĉ Z-f)" kun noto, ke la nomoj inter krampoj estas skribitaj ruslitere. Atentu, ke la familia nomo ne estas skribita komplete, kaj la nekutiman formon Ludvigo (laŭ PIV Ludoviko). En sia 30-a vivojaro Zamenhof do ŝanĝis sian nomon.

Nun mi volas okupuĝi pri la familia nomo Zamenhof. Ĝi estas evidente germandevena, kunmetita el du vortoj: Samen - semo, Hof - korto. En la Zamenhofa familio oni parolis ruse. En tiu lingvo ne ekzistas la konsonanto "h". Fremdajn vortojn, enhavantajn tiun ĉi konsonanton, transkribas rusoj per "g" (ekz. Gitler). Oni devas do

rajte supozi, ke la familianoj prononcadis sian nomon "Zamenhof", ĉar la germana "s" estas prononcata "z". Sed jam en la 1-a n-ro de la Esperantisto (1. sept. 1889) oni legas sub la gazettitolo la germanan kaj Esperantan kolofonojn. En la unua estas: Dr. L. Samenhof, en la Esperanta Dr. L. Zamenhof. Sur p. 473 de Originala Verkaro, en la antaŭlasta alineo, mencias d-ro Dieterle, ke "Ofte Zamenhof subskribis sian nomon ne kun ĉiuj literoj sed nur kun kelkaj, ekz. 'Zamenh...' aŭ alimaniere." Sur p. 488 de la OV oni trovas sub n-ro 101 poŝtkartan informon al la jam menciita Vladimir Majnov: "Via L. Zamen..." La samon oni vidas sur p. 499 sub leteroj n-ro 139 kaj sur p. 500 n-ro 140. Ĉu tio estas taktiko pro la "h" kaj "g"? Aliaj rimarkindaĵoj: OV p. 585, n-ro 375: Recepta folieto 26.II. (11.3.) 1910: pollingva surprasaĵo: Dr. Ludwik Zamenhof. Sed por rusaj pacientoj li eble havis receptojn kun rusalfabeta surpraso? Sur p. 602 oni vidas leterpaperon kun surprasita nomo: Dr. L. Samenhof, dato 4/17 II. 03, sur la plua paĝo: Dro. L. Zamenhof (sen dato, laŭ noto de d-ro Dieterle eble 28. aŭ 29. X. 1907). Tial mi pensas, ke nia Majstro unue germanigis kaj poste esperantigis sian nomon pro taktika efiko: por esti pli proksima al "okcident-lingvanoj".

Rimarkigo de la redakcio: la rusa transkribas "h" ankaŭ per "Ĥ" (ekz. Ĥemingvej)

PEDAGOGOJ LERNAS ESPERANTON

Mi venis al ideo proponi instruadon de Internacia Lingvo al Pedagogia Fakultato (post traktado de AIS kun UK Praha). Persone mi vizitis la fakultaton kaj estis agrable akceptita de la prodecano doc. Pulpán, kiu tre interesiĝis pri la afero. La kurso komenciĝis modeste kun 4 studentinoj, aliĝis ankaŭ gimnazia profesoro kaj aliaj. Hodiaŭ vizitas la kurson 11 personoj. Tiel ekestis intereso fondi centron de informoj ankaŭ ĉe PF en Hradec Králové. Kvankam en kurso por progresintoj studas nur 6 personoj, duono el ili veturos al UK en Vieno.

(Karel Kopecký, Třebechovice)

INFORMA DORSOSAKO

estas projekto de la nederlanda E-junularo dotita per 5000 guldenoj, kies celo estas trovi pli bonajn varbilojn kaj argumentojn por E-movado. Nun oni kolektas propagandilojn (afiŝojn, flugfoliojn), ankaŭ nacilingvaj. En ĈSFR kolektas ilin Vláďka Chvátalová, Vysočanská 763, 582 91 Světlá n.S.

DÜRRENMATT PRI HAVEL EN KONTAKTO

La junulara E-gazeto Kontakto publikigis tradukon de parolado de la fama svisa dramverkisto kaj pentristo Friedrich Dürrenmatt (1921-1990), kiun li prezentis - mallonge antaŭ sia morto - okaze de la transdono de la premio "Gottlieb Duttweiler" al Václav Havel la 22-an de novembro 1990. La svisa aŭtoro komparas Ĉeĥoslovakion kun Svislando, kiu neniam renkontis okupaciojn kiel ni sub Habsburgoj, Hitlero, Stalino, tamen svisoj estas liberaj mal-liberuloj gardantaj sin mem en la karcero de sia neŭtrala ŝtato. Li avertas kontraŭ la ilu-

zio, ke en Okcidento estas ĉio en ordo, kaj montras, kiel la merkato-ekonomio movata de konkurenc-batalo elrabas la Trian Mondon aŭ diktas al la vivo ĉieregan konsumadon, reklamadon, komercadon, konsum-kulturon kaj inform-inundon.

ESPERANTO EN VIDEOSTOP

Por la 8-a de novembro 1992 estas planata partopreno de esperantistoj en la fama televida konkursa programo Videostop.

(Květa Hubnová)

ESPERANTO-TAGOJ EN STASZOW

Esperanto-klubo, 28-200 Staszów, Paskowa 6, Pollando, okazigas la VI-ajn Esperantotagojn 21.-24.05.1992 en Staszów kun prelegoj, lecionoj, foto-ekspozicio, vizito de ĉevalbredejo, diskoteko, vespera bruloŝtiparo, muzika recitalo de Georgo Hanzlik, ekskurso al Ujazd, Sandomierz. Aliĝkotizo 200.000 zł., 150.000 zł. por studentoj kaj senlaboretoj, 100.000 zł. por infanoj ĝis 16-jaraj. Eksterlandanoj pagos surloke.

INTERNACIA LITERATURA FORUMO

Bulgara Esperanto-Asocio kaj Kooperativo de Literatura Foiro bonvenigas al la 11-a Internacia Literatura Forumo pri la porinfana literaturo en Esperanto, en Vraca 1992-06-27/07-02. Koncerto de Nikolín, recitalo de E-poetoj, ekskurso kaj koncerto en kaverno Ledenika, renkonto kun vracaj verkistoj, interlingvistika fako. La kotizo (inkluzivanta nur la programon) estas 20 usonaj dolaroj pageblaj al pĉk 12-11114-5, Kooperativo de Literatura Foiro, cp. 303, CH-1008 Prilly, Svislando.

LANDO DE SENMORTAJ KANTOJ

En la juneco ni estas tiom okupitaj per ekkonado de ni mem, ke ni ofte ne rimarkas trezoron troviĝantan en tuŝapuda proksimeco de nia mano. Mi devis veturi al pluraj maroj por trovi la padon, kiu kondukas al la hejmlandaj kamplimoj.

Mi memoras tiun tagon kaj tiun posttagmezon, kiam mi aŭtis el Brno al Hodonín fari reporton en la korto de la dometo, en kiu naskiĝis prezidento TGM. Subite mi devis haltigi la ĉaron, kvazaŭ sorĉita mi eksidis sur la rando de fosaĵo, atente aŭskultante la susuradon de la maizaj spikoj, kaj la vento alblovitis sur paĝon de mia notlibro versojn pri tiu reveno, pri la pejzaĝo, kiu min alparolis. Mi intimigis kun la homoj de la regiono, kie ni ĉiuj naskiĝis, miaj gepatroj kaj ankaŭ mi. Tuj antaŭ la milito mi estis raportisto pri folkloro festivalo en Uherské Hradiště. La epoko, en kiu ni serĉis apogon ĉe la radikoj de la nacia vivo, akriĝis mian rigardon. Kaj kiam ekiris kontraŭ mi vicoj da knabinoj, elastpaŝe, kun sensotentaj ritma balancado de antaŭtukoj, post ili atletkorpaj junuloj, knaboj bravaj, fine la maljunaj, al kiuj la tempo gravuris en la vizaĝoj trajtojn de travivita suferado kaj kun ĝi amon al la lando kaj respekton al ĝia majesteco. - Subite mi havis por tiu torento de viva beleco nek vorton, nek voĉon. Emocio ne estas ordonebla, nek provokebla. Sed eksplodinte ĝi estas kvazaŭ lafo. Kaj revenoj de perdiĝintaj filoj kutime estas la plej varmentaj.

La folkloro arto ĉe ni dekadencis; sed en la momento de plej granda danĝero ni spertis, ke ĝi garantias senmortecon. Mi travivis ĝin printempe 1944 ĉe sekreta seminario de muzikaj korpusoj en Velká nad Veličkou. Tiam mi komencis verki mian amkonfesion al la naskiĝa regiono, la moravi-slovakian rapsodion En la valoj tagiĝas. Fine mi komencis kompreni la Moravian Slovakion. Kiel buntas la pejzaĝobildo de la deklivoj de Kopanice trans Hornácko ĝis la riĉaj pladoj de rikolto en Dolňácko kaj Podluží, tiel varias la folkloro kostumo, la rava ebrigi de la koloro kaj ornamento; alinuanĉe gustas la vino kaj ŝanĝiĝas ankaŭ esprimiĝo muzika. Kie prosperas fruktarbaj ĝardenoj kaj stretaj tuketoj da kampoj kuniĝis en vastegajn hubojn, tie sonas la muziko alie ol tie, kie kreskas pli da vito, aŭ kie pinaro grimpas sur montetoj. Kaj la violonistoj el Kopanice - ili havas duontonojn, kvarontonojn kaj ankoraŭ falsajn tonojn, kiuj estas ne noteblaj. Sed ĝuste ili enhavas la veron de la vivo. Sed kelkajn kvalitojn vi trovos en Moravia Slovakio ĉie. La moraviaj slovakoj estas sagacaj, komprenemaj, el iliaj paroloj fajreras lapidara spriteco. En laboro ili estas persistemaj, al abrupteco aliĝas foje vantemo kaj kalkulemo, kiuj helpis vivi en malfacilaj tempoj, alifoje troa bonkoreco kaj sincereco.

La vento, kiu trakuras valojn, ŝanĝiĝas en varman spiron, kiam ĝi vidas, ke ĉiuj floroj rendevuas sur la kufoj, tukoj kaj

jupoj de junulinoj. Kaj tiam mi eksentas la venton en la vizaĝo, ĝi memorigas al mi tempojn, kiam per pezaj botoj stamfis ĉi tie la perforteco de militoj, poste servuto premis la homojn al la tero, ĝis fine la koloroj de maj-arboj kaj ilia brilo eniris en la korojn por ĉiam. Kiu vidis kanti kaj danci niajn popolajn ensemblojn en eksterlando, kie ili gajnas unu konkurson post alia, ankoraŭ pli klare konscias la vivantan riĉaĵon kaj eksentas profundan dankemon al tiuj, kiuj ĝin konservis.

La folkloran festivalon en Dolňácko foje vizitis kun mi franca verkisto Robert Merle. Li volis forveturi post la programo, sed mi sukcesis per petegado konvinki lin, ke li restu almenaŭ dek kvin minutojn kaj aŭskultu de proksime la moravislovakiajn muzikistojn. Poste pasis horoj. Nur longe post la noktomezo Merle rekonsciis. Li dankis min: mi ne povus alimaniere ekkoni la admirindan vitalecon de via popolo, lian senton por arto, la vespero estis por mi ne forgesebla. -

Domage, ke li ne restis la tutan nokton por ekkoni la plej belan veksignalon en la vivo. Plej intimaj estis al mi la muzikistoj tiam, kiam ĉirkaŭ la kvina matene eksonis sub fenestro ilia kanto. Ĝuste komencis pluveti, la muzikistoj devis kaŝi sin endome. Ili ne povis disiĝi de siaj arcoj, en kantado ili perdadis la konscion. - Tia beleco, la kapelestro premis la kapon per manplatoj - oni povus eĉ suicidi pro ĝi ... La forto de la arto transpaŝas la homajn limojn. Ankoraŭ min transpaŝis tiam la sento, kiel tre multe mi estas filo de tiu ĉi lando, de tiu ĉi arto.

Kun mi venis junaj filmistoj el Prago, komence profesie indiferentaj, gaje cinikaj. Sed ili ne rezistis.

- Mi pensis, ke mi jam ĉion en la vivo ekkonis kaj travivis, diris al mi unu el ili en subita atako de sincereco - sed tiajn homojn, kiel ĉi tie, tiajn mi ankoraŭ ne konis. Ĉi tie la homoj enhavas tion, kion faras el homo homon. -

La sekvan tagon matene mi haltis ankoraŭ en lernejo. Iom nostalgie mi demandis pri la kantoj - kaj la infanoj ekkantis. Dankeme mi ekpensis: Ne, la beleco neniam pereos.

Kiam mi estis adiaŭanta, mi promesis al mi mem, ke laŭ miaj ebloj - mi revenados kaj serĉados sur la moravislovakiaj herbejoj la perditajn dukatojn de juneco kaj beleco kaj riĉecon de emocioj. Kaj kiomfoje mi trovos ĝin, mi konfidos ĝin al zimbazono por muzikigi ĝin ĝis la blanka mateno.

tradukis M. Malovec



Vojaĝagenturo TOURCLUB el Břeclav kulabore kun Esperantista Klubo en Strážnice proponas al esperantistaro **vojaĝekskursojn al UEA Kongreso 1992 en Vieno:**

25. - 27.7.1992
31.7. - 2.8.1992.

PROGRAMO:

1-a tago:

* individua alveturo de partoprenantoj en la posttagmezaj horoj al Břeclav (ĝis la 19-a horo), loĝigo en la hotelo Grand, vespermanĝo, societa vespero kun gustumado de vinoj kaj folkloro muziko;

2-a tago:

* matenmanĝo, forveturo al Vieno aŭtokare, vizito de la kongreso, por interesitoj rondveturo tra Vieno, vespermanĝo kaj tranokto en Břeclav;

3-a tago:

* forveturo post matenmanĝo al Strážnice, vizito de internacia

filatela ekspozicio "Komenio kaj interlingvistiko en filatelo", reveno al Břeclav, tagmanĝo, en la posttagmeza horoj forveturo.

En la prezo de la ekskurso estas:

2x loĝado, 2x matena kaj vespera manĝoj, 1x tagmanĝo, societa vespero, transporto al Vieno kaj al Strážnice, ĉiĉerono kaj asekuro por Vieno.

Enirpago por la kongreso ne estas inkludita en la prezo, eblas aĉeti la enirbileton en la kongresa centro en Vieno - prezo por unu tago estas 45,- nederlandaj guldenoj (NDG) aŭ en konvertebla mono.

Plena prezo de la ekskurso por unu persono estas 900,- Kčs.

Skribajn aliĝilojn sendu rekte al TOUR CLUB Břeclav, hotel Grand, Ing. Smyčka, tel. 0627 / 23802, fax 0627/23601.

inter 
helpo

Pli multe da informoj vi povas akiri je la adreso: INTERHELPO, poŝtkesto 44, 150 00 Praha 5, tel., fax: 02(Praha)/542993.

INTERHELPO ofertas ankaŭ siajn servojn en la tutjare malfermita kaj bone ekipita turisma tranoktejo en Praha 5 - proksimume 150 m de la metroa stacio Radlická en du- kaj trilitaj ĉambroj. Prezo por unu persono kaj tago estas 60,- Kčs.

*** La ŝeĥoslovakaj esperantistoj, kiuj dezirus konatiĝi kun Turkio, rekte povas skribi al la geedzoj Halil kaj Fevzye Dedekan, Soydas, 39310 - Kaynarca, Pinarhisar, Turkio. * * * * ***

EKSPOZICIO PRI KOMENIO

Vendrede la 28-an de februaro malfermis la direktoro de Silezia Landa Muzeo en Opava d-ro Kalus la ekspozicion omaĝe al jubileo de Komenio iom nekutime, sed trefe, ĉar li la ĉeestantaron alparolis per la svahila, kiu estas ankaŭ parte planlingvo, pri kies principoj li poste parolis en diskuto. En la ĉefparolo pri "Panglottia - internacia lingvo de ideo ĝis realigo", kiel la ekspozicio nomiĝas, skizis inĝ. V.Kočvara jarcentajn klopodojn krei taŭgan kaj praktike uzeblan internacian lingvon, kiu fine estas nur Esperanto. En la ekspozicio estas vidindaj kelkaj valoraj esperantaĵoj inkluzive la unua ĉeĥa lernolibro de Lorenc. Krom pri Komenio kaj Esperanto mem estas parto de la ekspozicio dediĉita al interlingvistiko kaj al diversaj aliaj planlingvoj, de kiuj vidiĝas bazaj lernolibroj, ekzemple de volapuko, Ido, Novial, Slavina esperanto, Interlingua, Basic english kaj aliaj.

La ekspozicio vekis vastan intereson pro sia unikeco kaj profunda prilaboro de unu el gravaj ideoj de Komenio, tial la vizitantoj en la literatura fako de la muzeo, nome Památník P.Bezruče multnombras. Pri la ekspozicio jam aperis kelkaj raportoj en la nacilingva gazetaro. La organizintoj de la ekspozicio Esperanto-rondeto Ostroj en Opava invitas al la vizito ankaŭ niajn legantojn. La ekspozicio daŭros ĝis majo.

SEMINARIO PRI PUBLIKA AGADO

Kvindeko da esperantistoj el 11 landoj ĉeestis en la tagoj 29.2.-2.3. 1992 en Poprad la internacian seminarion pri pub-

lika agado, kiun kunvokis en la asocian domon de SEA universala Esp.-Asocio: La unua parto estis dediĉita al problemoj ligitaj al kontaktoj kun amaskomunikiloj, en la dua parto estis traktitaj manieroj de rekta efiko sur publikon. Siajn spertojn al la aŭskultantoj transdonis konataj esperantistaj fakuloj, kiel S.Maul, redaktoro de Monato, i.Durwael, estrarano de UEa por informado, kaj St. MacGill, prezidanto de ILEI kaj publika aganto. Ĉeestis ankaŭ la nova redaktoro de la revuo esperanto I. Ertl. Fine de la konsultiĝoj oni eĉ faris praktikan ekzercon, en kiu devis ĉiuj pogrupo prepari bazan dokumentaron por sukcesa realigo de Universala kongreso de Esperanto en fikcia lando Mezeŭrio, kiu estis karakterizita per kelkaj sociaj, kulturaj kaj historiaj donitaĵoj (ekz. en unu vilaĝo tranoktis iam E.Pri- vat dumvoje al UK, sekve de tio enloke vivetis E.-grupeto). La tutan tempon de restado en Poprad uzis ĉiuj frekventintoj por pridiskuti staton de la movado en koncernaj patrolandoj (ekzemple la plej novajn informojn donis partoprenintoj el Albanio, Estonio, Kroatio) kaj por ligi diverstemajn kontaktojn inter asocioj. el nia asocio la seminarion partoprenis inĝ. V.Kočvara kaj VL. Hasala.

- kov -

Ministro de kulturo de Ĉeĥa respubliko Milan Uhde akceptis la peton de prezidanto ĈES kaj transprenis la aŭspicion super la antaŭkongreso de esperantistoj en Prago. Senkoste disponigis la 22.7.1992 - por faka seminario okaze de la 400-jara datreveno de naskiĝo J.A.Komenio - la Kavaliran Salonegon de Valdštejn-palaco en Prago.

"ESPERANTISTOJ, HELPU NIN!",

vokas pere de la VERDA HELPO, naturprotekta sekcio de ĈEA, du malgrandaj orangutanidoj en la zoologia ĝardeno de Ústí nad Labem. Iliajn gepatrojn mortigis ŝtelĉasistoj, kiuj kontra-bandis la du idojn en Eŭropon, senskrupule endanĝerigante ankaŭ iliajn vivojn, kvankam la "arbara homo" (= orang-utan), kiel nomas ilin borneanoj, apartenas al elmortantaj specioj. Ilia sanstato estis kriza kaj nur ilia rapida lokigo en la zoo de Ústí savis iliajn vivojn. Tamen la danĝero ankoraŭ ne pasis, ĉar por ili ne ekzistas taŭga pavilono, nek mono por ĝia konstruo. Tial la estraro de la zoo kun la kuracistoj kaj flegistoj establis fondaĵon por kolekti monon, kiu ebligis konstrui pavilonon de orangutanoj.

Ĉiuj, kiuj povas kaj volas helpi kaj kontribui al savo de ilia vivo, sendu iun monon, al la fonduso 1734-911 ĉe: Investiční banka v Ústí nad Labem, variabilní symbol ORANGUTAN-ESPERANTO.

VERDA HELPO alvokas esperantistojn: rezignu pri unu panbulo kaj sendu almenaŭ la ŝparitajn dek kronojn.

Milena kaj Štefan Takáč

VINTRA SPORTA RENKONTIĜO de junaj esperantistoj "Ledňáček - Januereťo" okazis jam tradicie de 30.1 ĝ. 2.2.1992 en Hor. Polubý en nordorienta Bohemio. Partoprenis ĉ. 40 homoj (9 infanoj), el ili 9 el Pollando.

Partoprenintoj ekskursis skie kaj piede, kelkaj alpinis. Vespere okazis amuzprogramoj kun kantado en amika etoso.

Venontan "Januereťon" ankaŭ vi povas partopreni en la tagoj 27/31.01.1993. Loko de aranĝo estos surprizo. Adreso: J. Navrátil, Masarykova 1596, 415 01 Teplice.

ANKORAŬ PRI "ĈESKOSLOVENSKÝ"

En la kunmetita adjektivo ĉeskoslovenský, la de misubstreĵita o ne estas finaĵo, sed kunliga morfemo, kiajn oni renkontas en multaj lingvoj (helena, latina, ĝermanaj, slavaj k.a.). Ĝi servas kiel parolprotezo por eviti konsonantamasigon. Tia protezo aliĝas al radikfino, post forigo de finaĵo. "Ĉeskoslovenský" ne estas belsona, same kiel "indgermanisch", "termmetro" k.t.p. La morfemon oni nomas latine: Ligamen in verbis compositis. Memkomprene, en lingvoj povas funkcii tiamaniere ankaŭ aliaj vokaloj, ekz. e en la ĉeĥa vorto: dějepis.

RNDr. Josef Kavka, CSC

PROTIS - PRESO KAJ PROPAGANDO -

estas la firmao nun prezanta la gazeton Starto. Bonkvalite ĝi presos ankaŭ por vi, tute laŭ viaj postuloj, diversajn presaĵojn (broŝurojn, vizitkartojn, flugfoliojn ktp.) ankaŭ en Esperanto. Adreso: PROTIS, 664 36 Podolí u Brna 393; telef. 05 (Brno)/ 91639.



LINGVOJURAJ KONSIDEROJ PRI ESPERANTO

La germana psikologo Helmut Welger (Bismarckstr. 28, D-W-3550 Marburg) pritraktas la konstituciajn leĝojn de Esperanto - la Fundamento kaj la Deklaracion pri la esenco de la esperantismo - per jurista metodo. La ĝis nun aplikataj lingvistikaj metodoj montris, ke multaj reguloj en la Fundamento estas ne sufiĉe klaraj, kompreneblaj laŭ du aŭ pluraj logikoj, kio kaŭzis multajn miskomprenojn kaj vivigis kelkajn skolojn batalantajn unuj kontraŭ la aliaj akuzante sin reciproke pri atencado de la Fundamento. La jurista metodo povas pli precize determini, kion la Fundamento vere priskribas kaj en kio ĝi donas liberecon al la unuopaj parolantoj influitaj de la gepatra lingvo. La verketo en 7 ĉapitroj pritraktas la esperantistaron kaj ĝiajn konstituciajn normojn, la rolon de la Akademio de Esperanto, la rolon de la logiko en lingvo kaj ĝian aplikadon. En suplemento "Lingvojuristaj ekspertizetoj" la aŭtoro aplikas sian metodon al kelkaj konfliktaĵaj aferoj en la E-gramatiko (tiel-tiom, la perfektaj kaj imperfektaĵaj tempoj, la verbokategorioj, vortfarado).

Eventualajn koliziojn inter la lingvaj normoj (la 16-regula Gramatiko, Universala Vortaro, Ekzercaro en la Fundamento kaj oficialaj akademiaj Aldonoj al la Fundamento, kiuj ĉiuj kvar estas jure samrangaj) eblas solvi laŭ ĝeneralaj juristaj principoj, kiuj garantias senkontraŭdiran interpreton de normtekstoj. La Fundamento estas por ni esperantistoj la "libro de premisoj" - la deman-

do pri ĝusteco de la premisoj ne stariĝas, ĉar ĉe normoj ne temas pri ĝusteco aŭ malĝusteco, sed pri valideco aŭ nevalideco. La solvo de lingvaj demandoj ofte ne eblas per logika deduktado, ĉar la Fundamento simple ne entenas la bezonatajn premiasajn normojn.

16-A KONGRESO DE ASOCIO DE SCIENCIOJ KAJ ARTOJ

Ĉeĥaj kaj slovakaj sciencistoj kaj artistoj vivantaj en ekzilo fondis en 1958 Ĉeĥoslovakian asocion de sciencoj kaj artoj en Vaŝingtono. Finfine povas la 16-a kongreso okazi en la hejma lando, nome en Prago (25.- 28. 6.1992) kaj en Bratislava (29.6.- 2.7.1992).

Unuafoje renkontigos ekzilaj kaj hejmaj aŭtoroj. (Adreso: Sekretariát Rady českých a slovenských vědeckých společností, Národní tř. 3, 111 42 Praha 1, Ĉeĥoslovakio).



ATENTON,
FERVOJISTOJ!

Fervojo ligas landojn en la tuta mondo. **Internaca Fervojista Esperanto-Asocio (IFEFE)**, la plej vasta esperantista faka organizo eliĝinta al UEA, intencas pligrandigi sian anonon en ĉiuj landoj, ĉefe en la landoj, kie ankoraŭ ne estas kunordigitaj izolitaj fervojistoj, membroj de IFEF. Interesitoj kontaktu la Sekretarion de IFEF: d-ro Romano Bolognesi, Via Misa 4, I-40139 BOLOGNA, Italio, aŭ telefonu al numero: 003951/547247.

DIVERSAĴOJ EL LA KOMUNUMA VIVO

Esperanta klubo "Amikeco" ĉe Unuĝinta Klubo de Laboristoj en Česká Třebová kunlabore kun lokaj membroj de Fervojista Sekcio ĈEA aranĝis sabate la 8-an de februaro 1992 jam la 27-an Esperantan Balon.

Ke oni ŝatas partopreni tiun ĉi tradicie "nefumanta" balon atestas ambaŭplene okupitaj salonoj de UKL. La balon okupis ne nur esperantistoj el diversaj partoj de Ĉeĥoslovakio, sed alvenis ankaŭ gastoj el najbaraj landoj - Germanio kaj Pollando, eĉ el malproksima Nederlando. La organizantoj preparis ne nur riĉan tombolon, sed ankaŭ kelkajn amuzajn programe-rojn, kiuj kune dancmuziko bone amuziĝis ĉiujn partoprenantojn.

-JT-

Prelegojn en lernejoj peris Esperanto-klubo en Strážnice. D-rino Věra Barandovská prele-gis pri Komenio en gimnazio de Strážnice (27.1.1992) kaj en metilernejo vitrofarista en Kyjov (28.1.1992). Pli ol 600 gelnantoj aŭskultis rakonta-don pri la "instruisto de naci-oj", pri lia ideo de internacia lingvo kaj kompreneble ankaŭ pri Esperanto.

VIHa

Regionaj adresaroj ne estas problemo havigi, ĉar la adresa-ro de ĈEA estas prilaborita perkomputile. Pri la adresoj de samidanoj de la regiono aŭ distriktio povas la interesitoj peti sekretarion de ĈEA, se ili ekzemple intencas fondi novan klubon aŭ rondeton ktp.

red.

Anekdotoj pri famaj homoj estas la titolo de nova amuza

legaĵo eldonta de SEA. Ĝi estas mendebla ĉe SEA (Esperanto-Centro en Poprad) kaj ankaŭ ĉe ĈEA por 28 Kčs. Tradukis E. V. Tvarožek - 64 paĝoj, 116 anek-dotoj pri 71 artistoj, scien-cistoj kaj politikistoj.

red.

La Esperantista Klubo en Prago prezentas pri si jenajn nombrojn:

- en la libro de vizitantoj subskribis sin en la jaro 1991 983 personoj (pluraj aliaj for-gesis), el ili estas 855 mem-broj, 54 nemembroj el Ĉeĥoslo-vakio, kaj 74 eksterlandanoj;
- alilandanoj venis el 13 lan-doj eŭropaj, 2 el Usono, po 1 el Ĉinio, Koreio kaj Turkio.

Plej multe estis reprezenti-taj Danlando kaj Svedlando po 5, Sovetio kaj Pollando po 4, Francio 3. Plej granda ĉeesto-nombro: 28 (la 18-an de febru-aro 1991).

En la jaroj 60-aj kaj 70-aj estis la kutima nombro de vizi-tantoj, precipe en la strato Reznická, 50 - 60, ja eĉ 80 personoj.

JM



NI KONDOLENCAS

La 22-an de januaro 1992 subite mortis sekretario de esperantista rondeto AMIKECO el Nový Jičín - Libohošť, inĝ. JUDr. Miroslav Tůma, CSC, aŭtoro de la libro "Pri la varmo", multjara oferema kaj laborema esperantisto, membro de AIS San Marino. Li forpasis meze de poresperanta laboro en aĝo de preskaŭ 72 jaroj. Honoron al lia memoro!

-SR-



KUNSIDO DE KUNORDIGA KOMITATO

La 29-an de februaro okazis en Poprad la kunsido de Kunordiga Komitato de ĈEA kaj SEA. La ĉefaj diskutproblemoj rilatis al la ĉijara UK en Vieno kaj partopreno de niaj ambaŭ asocioj en ĝia preparo kaj organizado. Kvankam en tiu ĉi direkto ne mankis iniciatoj de niaj asocioj, la organizanto de la kongreso - Centra Oficejo de UEA en Roterdamo - ĝis nun ne tro niajn ofertojn akceptis, malgraŭ tio ni antaŭvidas gravan engaĝigon de nialandaj esperantistoj en Vieno.

En la plua programo oni decidis sian atenton al plia precizigo de komunaj aferoj - la eldon-agado, membrostato, ekstera informata agado ktp. Ĉiujn diskutatajn demandojn jam aprobis la Konsilio de ĈEA dum sia lasta kunsido la 7-an de marto.

- kov -

TERMINOLOGIA ESPERANTO-CENTRO EN Kladno

Tec de UEA por faka lingvo en Esperanto transiris el la militanta Zagrebo al Kladno en ĈSFR. Ĝia gvidanto estas inĝ. Jan Pospíšil. TEC preparos terminarojn, fakajn vortarojn kaj tekstojn, por ke Esperanto povu penetri en la sciencan kaj teknikan. Por akiri pliajn monrimedojn por TEC estis fondita kaj jure registrita "**Nezávislá terminologická nadace** (Sendependa terminologia Fondado), Ing. Jan Pospíšil, Leningradská 3112, 272 04 Kladno 4" (tel. 0312/781547). Al fondoĵoj eblas donaci ne nur monon, sed ankaŭ ĉekojn, akciojn, obligaciojn. Jam deko da aktivistoj de la sciencteknika sekcio promesis donaci al TEC kaj ĝia fondoĵo dek procentojn de siaj akcioj,

kiujn ili akiros per la kunpona privatigo.

J.P.

Fervojista renkontiĝo efektiviĝos 3.-5.4.1992 en Pĕřerov kunlabore kun EK Pĕřerov (ekskurso al la kastelo Helfštýn, vizito de forĝista muzeo, tra-rigardo de la urbo, diapozitivoj pri Komenio kaj muzeo de Komenio, papilio-kolekto, amuzvesperoj). - jt -

Ekzamenoj UEA/ILEI okazos dum la UK Vieno, marde posttagmeze. Anticipa sinanonco de interesitoj al la adreso de la kasisto de ILEI: Bertil Andrasson, Sodra Rorum pl. 455, S-242 94 Horby, Svedio. Pagoj eblas laŭ favora tarifo al poŝtĉironto 682117-7 en Stokholmo (90 svedaj kronoj) aŭ al konto "ilek-a" ĉe UEA (30,- gld.). Bonvolu anonci ankaŭ la aspiratan nivelon (elementa aŭ meza). Eventuale oni organizos la ekzamenojn ankaŭ dum ILEI-konferenco en bratislava tuj post UK.

Asociaj ekzamenoj okazos la 25-an de aprilo 1992 en Prago, kooperativo Interhelpo, Pechlátova 14, proksime de la metrostacio Radlická. Ekzameno "pri scio" kostas 60 Kčs kaj "pri kapablo instrui" 200 Kčs. La pli superan ekzamenon povas fari nur tiu, kiu jam havas pri scio". Aliĝojn akceptas Miroslav Malovec, Bosonožská 15/10, 625 00 Brno.

ELDONA FONDAĴO - PRESKOREKTO

En Starto 1/1992 ni alportis informon pri fondo de eldona fondoĵo fare de s-ino Anna Milatová per 2.000,- Kčs. Fakte la fondoĵo estis fondita per 3.000,- Kčs. Redaktoro de Starto petas pardonon de legantoj kaj precipe de s-ino Milatová.

Diferenco inter la bestoj kaj homoj estas precipe en psikologia vidpunkto. Sed ankaŭ ĉe bestoj ni konas, ke ekzemple hundo povas havi pilkon, oston ktp., kiel sian propran amatan amuleton. Tre specifice ni povas paroli pri la homaj amo kaj religio. Jam ĉe tre primitivaj homoj, kiuj vivis en pratempo, arkeologoj ekkonis, ke ekzistis kultoj precipe al la Suno, fajro kaj ankaŭ al plantoj kaj floroj. Kulto estas propra interna psikologia sento. Kultaj plantoj estis en la manoj de reĝoj kaj reĝinoj, kiel ornamentoj sur muroj en temploj, kriptoj ktp. En mezepoko estis la kulto de la floroj tre forta, sed ĝis nuntempo ni povas paroli pri la kulto. Kiam ni donacas bukedon aŭ unu rozon, orkideon kaj aliajn florojn al niaj amatoj, tio estas la kulto. Precize ni povas paroli pri la kulto kiel pri sentoj al la personoj familiaj, religiaj, ŝtatestraj, kaj precipe al homoj, kiujn ni tre amas. La amo kun la kulto de la floroj, precipe la belegaj floroj, havas jam tiel grandan tradicion, ke ni trovas ĝin en libroj, teatraĵoj, poemoj kaj muzikaĵoj ĉe ĉiuj nacioj de la mondo.

La kulton de la floroj ni bone ekkonis ankaŭ kiel simbolon de amo pri edziĝfestoj, pri naskiĝo de infanoj kaj ankaŭ pri morto de homoj. La kultoj de la floroj pri funebraj ceremonioj estas konataj jam antaŭ miljaroj.

Sed la kulton de la floroj ni konas ankaŭ pro religiaj kaj medicinaj motivoj. Por tiuj ĉi celoj la homaro uzadis precipe venenajn plantojn kaj plantojn,


kiuj havas tre pitoreskajn formojn. Tre konata estas mandragoro, planto kun radiko en formo de homa korpo. Mandragoro estas la simbolo de la misteraj fortoj, fortoj de Hadeso, sed ankaŭ de la medicinaj magiaj fortoj. Multe da kuraciloj estis faritaj per helpo de la kultaj plantoj kaj oni uzas tiun ĉi metodon precipe ĉe ŝamanaj kuracaj metodoj.

La kulto de plantoj kaj floroj estas tre viva ankaŭ en nuntempo, kaj ni povas diri, ke ĉe ĉiuj nacioj, sur ĉiuj kontinentoj de nia terglobo. La kulto de la Kristnasko estas tre fama pro uzado de la ornamaĵoj kristnaskaj pinoj, piceoj aŭ abioj kaj de kristnaskaj floroj. Ekzemple *Euphorbia splendens* - oni nomas ĝin kristnaska rozo, kaj ni ĉiuj tre bone konas tiun ĉi planton kun ruĝaj folioj en formo de rondo, kiel reĝa krono.

Ankaŭ festado de la printempo estas tre forte kunligita kun kulto de la plantoj. Branĉoj de la saliko kun pitoreskaj infloreskoj, amentoj, kiujn ni ĉefe nomas "kočičky" (katidoj), kaj kultaj estas ankaŭ galantoj (neĝborulo, "sněžěnka"), branĉoj kun folioj de la betulo.

Ĉu estas bone, ke ekzistas tiaj kultoj? Certe jes. La kultoj alportas al homoj ĝojojn, emociojn de la amo kaj de la kunsento. La kultoj de la floroj kaj plantoj alportas al la homaro kulturan vivon, humanisman potencon de respekto kaj honoro.





KORSPONDI DEZIRAS:

El Ĉeĥoslovakio:

* Zdeněk MILITKÝ, Pražská třída 41, 370 01 ČESKÉ BUDĚJOVICE, 61-jara pensiulo deziras korespondi pri diversaj temoj, precipe pri la vivo kaj historio en diversaj landoj de la tuta mondo *

El Francio:

* f-ino Juliette LUCOT, Port de SAVOYEUX, 70130 FRESNE SAINT MAMES * f-ino Emilie BARTHELET, FRANCCOURT 70180 DAMPIERRE SUR SALON * f-ino Angeline POTHIAI, 70180 MEMBREY * f-ino Stéphanie CAVATZ, 70120 LAVONCOURT * f-ino Marie DIEUDONNE, 70180 MEMBREY * f-ino Emilie JARROT, 70180 DAMPIERRE SUR SALON * f-ino Cécile DEQUINCEY 70100 PIERREJUS * s-ro Aurélien FERRACCI, 70180 RAUCOURT * s-ro Mathieu POULNOT, 70180 ROCHE ET RAUCOURT * Fabrice ESSEIN, 70120 VILLERS-VAUDREY * - ĉiuj estas gelernantoj ĉirkaŭ 14-jaraĵ, ili kolektas poŝtmarkojn, bildkartojn ktp.*

El Pollando:

* s-ro Florian VALČAK, str. Piotrowska 84, 97-425 ZELOVO, 42-jara fraŭlo, li interesiĝas pri politiko, netradicia medicino, turismo * Marta TRYBEK, 25-521 KIELCE, ul Dabrowska 16/1, 11-jara komercantino serĉas geamikojn *

El Hispanio:

* Juan Antonio SANCHEZ, c/Hacienda de Pavones 220 2b, 28030 MADRID - hispana knabo, komercanto serĉas geamikojn *

ZPRÁVA ZE SEKRETARIÁTU ČES

Od 1. března 1992 až do odvolání platí tato nová, jednodušší a výhodnější soustava slev na veškeré zboží z prodejny ČES:

Při nákupu zboží se poskytují následující slevy:

zboží za nejméně:	sleva:
100,- Kčs	10%
500,- Kčs	15%
1 000,- Kčs	20%

Tyto slevy platí jak pro nákup přímo v prodejně, tak pro objednávky poštou, pro jednotlivce i pro objednávky klubů, resp. knihkupců. Při zásilkovém prodeji se k cenám připočítávají expediční náklady (balné a poštovné) jako dosud.

Využijte tedy možnosti nákupu zboží za výrazně sníženou cenu!

Český esperantský svaz hodlá obnovit činnost turistické sekce a proto hledá zájemce o aktivní spolupráci. Zájemci nechť se hlásí na adrese: Pavel Polnický, Příčná 150, 290 01 Poděbrady.

Jako platné budou posuzovány přihlášky na pražský předkongres podané od 30.3.1992. Proto každý, kdo již přihlášku zaslal před tímto datem, musí svůj požadavek obnovit podle regulí uvedených na str. 4.

URSULA ZILVAR komercperantino

Grubenhagenstr. 8, W-3420 Herzberg

Telefono + telefakso: 05521-1363

Mi serĉas komercpartnerojn, ekz. por historiaj akcioj + obligacioj, telefonkartoj, pentrobildoj, ikonoj, arĝentaj moneroj, antikvaj varoj. Bv. sendi ofertojn! Ĉu vi bezonas varojn el Germanio, ktp.?

Český esperantský svaz
110 01 Praha 1, Jilská 10
***** STARTO *****

Presorgano de Ĉeĥa Esperanto-Asocio.
Aperas 6-foje jare. Respondeca redaktoro:
Miroslav Malovec, Bosonožská 15,
625 00 Brno, Ĉeĥoslovakio.

Administrators: Karel Daněk, p.k. 425,
660 25 BRNO 2, Ĉeĥoslovakio.

Abonebla ĉe UEA, ĉe niaj perantoj aŭ rekte
ĉe nia asocio.

Nepravidelný věstník Českého esperantského
svazu. Vychází 6x ročně. Obdrží členové
svazu. Odpovědný redaktor - Miroslav
Malovec, Bosonožská 15, 625 00 Brno.

Administrátor: Karel Daněk, pošt. příhr.
425, 660 25 Brno 2.

Presas:



NOVINOVÉ DOPLATNÉ

Podávací pošta
664 03 Podolí u Brna
Povoleno JmŘS Brno
č. j. P/3-8847/91
ze dne 28.8.1991